
# KODEJO 2016

## Raporto pri la junulara movado



**7-a de marto de 2017**

Komisiono pri Landa Agado

Komisiono pri Scienca kaj Faka Agado

tejo — tutmonda esperantista junulara organizo

Enric Baltasar

# Enhavtabelo

**1. Enkonduko** 2

**2. Landa analizo** 3
2.1. Organizoj 7
2.1.1. Membreco en TEJO 7
2.1.2. Jura personeco 8
2.1.3. Vivstato de sekcioj 9
2.1.4. Evoluo de aktiveco 10
2.1.5. Agado 11
2.1.6. Informado 12
2.1.7. Kunlaborado 15
2.1.8. Ekonomio 19
2.1.9. Membroj 21
2.1.10. Estraro 22
2.1.11. Neesperantaj organizoj 24
2.2. Referencpunktoj 26
2.2.1. Evoluo de aktiveco 27
2.2.2. Distribuo 27
2.2.3. Kunlaborado 28
2.2.4. Informado 29

**3. Faka analizo** 31
2.2.1. Membreco en TEJO 31
2.2.2. Jura personeco 31
2.2.3. Informado 32
2.2.4. Kunlaborado 33
2.2.5. Ekonomio 34
2.2.6. Estraro 36

**4. Konkludoj** 39
4.1. Subvencioj 39
4.2. Funelo de Landa Agado 39
4.3. Eksigo 41
4.4. Fakaj organizoj 42
4.5. Invito al UEA 42
4.6. Interna prilaborado 42

# 1. Enkonduko

Kiam mi trejnas aktivulojn unu el miaj oftaj demandoj estas “Kion vi celas fari kiam vi prelegas pri Esperanto?”, kies respondo kutime estas “Informi onin”. Ne, informado ne estas celo, sed agado. La ĝusta respondo estas okazigi rezulton, kutime sukcesi ke oni faru agon kiun ni deziras, ekzemple eklerni la lingvon. Do simile kiel por prelegoj ni devas havi konkretajn celojn, kaj tiuj celoj fontas el la necesoj de la komisiono pri Landa Agado pri kion ni bezonas por agadi. Ni ne volas simple esti interesaj; ni volas ŝanĝi la realon.


Ŝanĝinte nian celon, ni faris profundan ŝanĝon en KODEJO por ekhavi datumojn kiuj laŭ ni estas baza neceso por la agado de TEJO en la direkto de pli forta movado. Ni eksperimentis, faris erarojn kaj aperigis kelkajn esplordemandojn kiuj estos la bazo por alitipaj demandoj en la estonteco. La projekto “TEJO” devas esti utila por la Esperanto-movado, kaj por scii kiel tio okazu ĉi regula esplorado estu unu el niaj ĉefaj iloj.

Parolante pri iloj, organizoj estas parto de pli granda universo. Ni decidis konstrui mondan junularan reton de individuaj (aktivuloj) kaj kolektivaj (organizoj) estaĵoj kun kiom eble plej multaj landoj en la tuta mondo. Ni volas krei sistemon kiu helpu nin kompreni kiel ni metu nian brikon, kaj ĉu oni bezonas brikon aŭ aliaĵon. Ni ekzemple volas havi manieron per kiu, kaze ekscii pri nova lernanto en ekzemple Belgio, ni povu kunigi ĝin kun aliaj junuloj.

Inter la strukturaj ŝanĝoj vi vidos ke ni ebligis la plenigon al referencpunktoj (reprezentantoj de landoj sen organizo) kaj fakaj asocioj kiuj estas en procezo aŭ pripensas krei junularan sekcion (tiel ni plibonigas nian alproksimigstrategion, ili havas malsamajn trajtojn kaj ĉar fari statistikumadon por du asocioj ne estas utile). Ni sukcesis ricevi datumojn el 60 landoj kaj 6 fakaj asocioj.

Mi volas fini aparte dankante la kontribuon de Stela Besenyei por la renovigo de la enketiloj (nun estas tri KODEJO-j en unu).

# 2. Landa analizo




La enketilon plenigis entute 60 landoj, kiuj partoprenis nome de landa junulara organizo aŭ landa referencpunkto:


- **Argentino** | Juna Esperantistaro Argentina (JEA)
- **Aŭstralio** | Referencpunkto
- **Aŭstrio** | Referencpunkto
- **Barato** | Barata Junulara Organizo (BJO)
- **Belgio** | Referencpunkto
- **Benino** | Benina Organizo de Junaj Esperantistoj (BOJE)
- **Brazilo** | Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)
- **Britio** | Junularo Esperantista Brita (JEB)
- **Burundo** | Junulara Esperantista Burunda Organizo (JEBUO)
- **Ĉeĥio** | Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ)
- **Ĉilio** | Ĉilia Esperantista Junulara Organizo (ĈEJO)
- **Ĉinio** | Referencpunkto
- **Danio** | Dana Esperanta Junulara Organizo (DEJO)
- **Dominika Respubliko** | Referencpunkto
- **Filipinoj** | Filipina Esperanto-Junularo (FEJ)
- **Finnlando** | Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO)
- **Francio** | Junulara Esperantista Franca Organizo (JEFO)
- **Germanio** | Germana Esperanto-Junularo (GEJ)
- **Grekio** | Referencpunkto
- **Hispanio** | Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS)
- **Hungario** | Hungara Esperanto-Junularo (HEJ)

- **Indonezio** | Indonezia Esperanto-Junularo (IEJ)
- **Irano** | Irana Esperantista Junulara Organizo (IREJO)
- **Italio** | Itala Esperantista Junularo (IEJ)
- **Japanio** | Japana Esperanto-Junularo (JEJ)
- **Kanado** | Referencpunkto
- **Kartvelio** | Referencpunkto
- **Katalunio** | Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ)
- **Kenjo** | Kenja Esperanto-Junularo (KEJ) *
- **Kolombio** | Kolombia Esperantista Junulara Organizo (KOLOMBEJO)
- **Kongolando** | Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo (DKEJO)
- **Koreio** | Korea Esperanto-Junularo (KEJ)
- **Kostariko** | Referencpunkto
- **Litovio** | Referencpunkto
- **Luksemburgo** | Referencpunkto
- **Madagaskaro** | Referencpunkto
- **Maroko** | Referencpunkto
- **Meksiko** | Referencpunkto
- **Nederlando** | Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ)
- **Nepalo** | Nepala Esperanto-Junulara Organizo (NEJO)
- **Nikaragvo** | Referencpunkto
- **Niĝero** | Referencpunkto
- **Norvegio** | Norvega Junularo Esperantista (NJE)
- **Pakistano** | Junularo Esperantista Pakistana (JEP)
- **Peruo** | Referencpunkto
- **Pollando** | Pola Esperanto-Junularo (PEJ)
- **Ruando** | Referencpunkto
- **Rusio** | Rusia Esperantista Junulara Movado (REJM)
- **Senegalo** | Referencpunkto
- **Slovakio** | Slovakia Esperanta Junularo (SKEJ)
- **Svedio** | Referencpunkto
- **Svislando** | Referencpunkto
- **Tajlando** | Referencpunkto
- **Tanzanio** | Junulara Sekcio de Tanzanio (JST)
- **Togolando** | Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj (JOTE)
- **Turkio** | Referencpunkto
- **Ukrainio** | Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo (ULEJ)
- **Usono** | Referencpunkto
- **Venezuelo** | Referencpunkto
- **Vjetnamio** | Vjetnama Esperanto-Junularo (VEJO)


Inter ili 35 estas landaj organizoj kaj 25 referencpunktoj:





La partopreno laŭ kontinento estas, de pli ĝis malpli, Eŭropo, Azio, Ameriko, Afriko kaj Oceanio, kiu unuafoje aperas en KODEJO.




Distingante inter aktoroj ni rimarkas ke Ameriko estas la kontinento kie la relativa proporcio inter landoj kun junulara organizo kaj landoj kun junaj aktivuloj sed sen organizo estas plej malsimila:



## 2.1. Organizoj




Entute partoprenis 35 landaj junularaj organizoj: Argentino, Barato, Benino, Brazilo, Britio, Burundo, Ĉeĥio, Ĉilio, Danio, Filipinoj, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Indonezio, Irano, Italio, Japanio, Katalunio, Kenjo, Kolombio, Kongolando, Koreio, Nederlando, Nepalo, Norvegio, Pakistano, Pollando, Rusio, Slovakio, Tanzanio, Togolando, Ukrainio kaj Vjetnamio.




### 2.1.1. Membreco en TEJO

Inter la partoprenintaj organizoj 29 estas sekcioj de TEJO kaj 6 ankoraŭ ne:





Kiel indikite de ili, ĉiuj nesekcioj senescepte ŝatus iĝi landaj sekcioj de TEJO. Ties situacioj tamen estas iom diversaj, el kiuj nur 2 rajtas aliĝi:


- 1 estas en aliĝ-procezo (Tanzanio).
- 1 rajtas rekandidatiĝi (Ĉilio).
- 2 nuntempe ne plenumas la formalajn kriteriojn (Pakistano kaj Barato).
- 2 estas en strukturig-procezo (Indonezio kaj Kenjo).

### 2.1.2. Jura personeco

Plej multaj organizoj ne havas juran personecon:




Pli konkrete pri la jura personeco eblas vidi ke ne estas iu signife pli ofta situacio, kvankam la plej havata estas dependeco de nejunulara organizo:





### 2.1.3. Vivstato de sekcioj

Se preni la landojn de niaj sekcioj kaj dividi ilin laŭ la maniero (ne)partopreni la enketon:


- **Partoprenis kiel organizo (29):** Argentino, Benino, Brazilo, Britio, Burundo, Ĉeĥio, Danio, Filipinoj, Finnlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Italio, Japanio, Katalunio, Kolombio, Kongolando, Koreio, Nederlando, Nepalo, Norvegio, Pollando, Rusio, Slovakio, Togolando, Ukrainio, Vjetnamio.
- **Partoprenis kiel referencpunkto (9):** Aŭstrio, Ĉinio, Grekio, Kanado, Litovio, Madagaskaro, Meksiko, Svedio, Usono.
- **Ne partoprenis (8):** Bulgario, Haitio, Israelo, Kroatio, Kubo, Portugalio, Rumanio, Serbio.

Estas interese ke, krom iu parta escepto, estas iel aktivaj tiuj de la unua kategorio, neaktivaj tiuj de la dua kategorio kaj mortintaj tiuj de la tria. Ŝajne ni trovis orientigilon por regule kontroli la viv-staton de niaj sekcioj.




## 2.1.4. Evoluo de aktiveco


Pli ol la duono de la landaj organizoj taksas sin pli aktivaj kompare al la antaŭa jaro, dum ĉirkaŭ kvarono estas same aktiva kaj alia kvarono malpli aktiva.




Al la demando pri kiujn aferojn la organizoj plej bezonas por kreski, oni ĉefe parolis pri informado, homaj rimedoj kaj lingva lernado:





Inter tio kion oni nuntempe ne faras sed volus aperas tro ofta mencio pri informado (16):





## 2.1.5. Agado


La ĉefaj aktivuloj troviĝas en unu aŭ pluraj urboj en +79% el la landoj:




En +73% el la landoj ĉefa loko de aktiveco estas unu aŭ pluraj urboj:





Kiam ni demandis pri la plej gravaj agadoj dum 2016 oni ĉefe parolis pri eventorganizado, informado, instruado kaj trejnado:





## 2.1.6. Informado


Sen paroli pri efektiva uzado, ĉirkaŭ triono de la organizoj havas propran internan komunikilon, havas publikan serĉil-troveblan ejon en Interreto aŭ ian komunikilon:





La plejmulto komunikas siajn novaĵojn en la nacia lingvo kaj Esperanto (29), pluraj nur en Esperanto (5) kaj unu nur en la nacia lingvo (1):




Por ke niaj komisiitoj sekvu ilian agadon estis rekomenditaj ĉefe Facebook-paĝoj (19/35), tre tempopostulaj manieroj (9, aldone konsiderante ke oni uzas malsamajn babilprogramojn) kaj pluraj en diversaj lokoj (9). Du organizoj sugestis plurajn komunikilojn.




Demandinte pri kiujn ilojn kaj teknikojn oni uzis por varbi, kaj poste kiujn oni ŝatus plibonigi, ni malkovris ke, komparante la uzadon kaj plibonigdeziron, ni plej povus helpi pri prelegoj, atelieroj, flugfolioj, surstrata homreklamado, vizitkartoj kaj afiŝoj.




## 2.1.7. Kunlaborado

En preskaŭ ĉiuj landoj ekzistas iel aktiva nejunulara organizo (31), sed ĝi ne ekzistas aŭ aktivas en kelkaj (4):





Pritraktante iom pli ĝenerale la temon, nun parolante pri nejunulara movado, plej multaj organizoj kunlaboras kun nejunuloj (24), sed signifa nombro ne faras tion (10) pro diversaj kialoj, kaj en kelkaj malmultaj landoj nur ekzistas junulara movado (2):





Ni petis taksi la teorian gravecon kaj praktikan kunlaboradon kiu ekzistas inter pluraj tipoj de organizoj. La averaĝa rezulto montras ke:


- Por la landaj junularaj organizoj pli gravas TEJO ol la samlanda patra organizo.
- Oni plej kunlaboras kun la landa nejunulara organizo, probable pro la fizika kunligiteco kaj videbla profito de tiu rilato.
- Estas pli da kunlaborado kun TEJO ol kun junularaj teritoribazitaj organizoj, kiel kluboj.





Kaj kun kiuj tipoj de organizoj oni kunlaboras, kun distingo inter junularaj kaj nejunularaj? Post la nejunulara landa venas ĉiuj junularaj teritoribazitaj Esperantaj, sekve nejunulara kaj nur poste ekvideblas la fakaj. Kaze de la universitataj grupoj ne identigis kontakton anstataŭ kunlaboro.





Rilate al landaj junularaj organizoj inter si, oni kunlaboras ĉefe neformale aŭ por io rilata al eventoj:





Se ne temi pri landaj junularaj organizoj, oni kunlaboras ĉefe pri eventoj:




Ĉar la kunlaborado postulas ke estu io interesa por alia flanko, jen tio kion oni diris povi proponi al aliaj aktivuloj:





La principo de intereso pri kunlaborado ankaŭ aplikiĝas al TEJO, tial ni listigis ekzistantajn aŭ ekzistontajn servojn niajn, kaj petis marki tiujn pri kiuj la organizoj interesiĝas:




### 2.1.8. Ekonomio


Preskaŭ la duono havas sufiĉe, iom da mono aŭ almenaŭ kontrolas financojn (20), kelkaj malpliaj deklaras sin sen financoj (15) kaj neniu havas malpozitivan bonhavon (0):





40% iam engaĝiĝis pri subvencipetado en la pasintaj tri jaroj (12), kaj 60% ne faris tion:





Por varbado, sed foje ankaŭ por vendado, 10 organizoj produktas sep malsamajn aĵojn, el kiuj nur oftas T-ĉemizoj kaj glumarkoj:








Sekve troviĝas la manieroj per kiuj oni perlaboris monon la pasintan jaron. Estas surprize ke nur 17/35 el la organizoj indikis ricevi monon per membrokotizoj:





## 2.1.9. Membroj

Evidente ĉiuj havas junajn membrojn, sed estas interese ke 12 akceptas nejunulojn sen havigi la rajton voĉdoni, kaj ke 7 havas simpatiant-kategorion.




En ĉi tiu momento estas ekzakte la sama kvanto da organizoj kun aĝlimo de 30 kaj 35 jaroj, kaj estas plimulto super 30 jaroj. Krome ni povas aserti ke TEJO kontribuis al la aĝoplialtigo de siaj sekcioj; same ni scias, ĉar oni diris, ke la tendenco de plialtigo daŭros. Aparte estas nur unu organizo kiu diris postuli minimuman aĝon.





## 2.1.10. Estraro


Tri estas la konsilata nombro da homoj minimume necesa por realigi kaj daŭrigi gravan projekton. Plej multaj el niaj sekcioj indikis havi almenaŭ tiun kvanton (23), sed signifa nombro ne havas sufiĉe (12):




En 24 el la organizoj oni devas porestrare voĉdoni loke, inter kiuj iom malpli ol la duono rajtigas fari tion per voĉtransdono. Kaj en 11 asocioj oni kutimas fari tion distance:




En plimulto de organizoj la Estraro ŝanĝiĝas regule kaj ofte:





Ni volis scii pri la uzado de retpoŝtlistoj; apenaŭ kvin organizoj havas liston nur por estraranoj:





## 2.1.11. Neesperantaj organizoj

Tre malmultaj organizoj membras en la junulara nacia konsilio de sia lando (3), dum la plejmulto ne estas ano (32):





Pli konkrete pluraj celas membriĝi (3), signifa nombro ne membras (13), la sama kvanto ne scias ĉu ĝi ekzistas (13) kaj en kelkaj landoj ne estas tia konsilio (3):



8.6%
8.6%
37.1%
37.1%
Jes, kiel plena membro
Jes, kiel observanto aŭ alia speciala membro
Laboras por membriĝi
Ne membras
Ne scias ĉu ĝi ekzistas
Ne ekzistas

## 2.2. Referencpunktoj

La aldona amplekso ekhavi referencpunktojn signifas por ni kalkuli kun plej multaj el la grandaj landoj de la mondo, kaj povi atingi la kvin tradiciajn kontinentojn.




Partoprenis 25 landoj kiel referencpunktoj: Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Ĉinio, Dominika Respubliko, Grekio, Kanado, Kartvelio, Kostariko, Litovio, Luksemburgo, Madagaskaro, Maroko, Meksiko, Nikaragvo, Niĝero, Peruo, Ruando, Senegalo, Svedio, Svislando, Tajlando, Turkio, Usono, Venezuelo.




### 2.2.1. Evoluo de aktiveco

Pozitivas ke estas pli da landoj sen organizo kiuj pliaktiviĝis ol landoj kun organizo, kaj ankaŭ estas malpli da landoj kiuj iĝis malpli aktivaj. Negativas ke la proporcio de landoj kun la sama stato de aktiveco iom kreskis.





### 2.2.2. Distribuo

En plej multaj landoj sen organizo estas junaj esperantistoj kaj almenaŭ kelkaj loĝas proksime (17), en malmultaj ili ekzistas sed ĉiuj loĝas malproksime (4), kaj en 4 la referencpunkto ne konas alian junulon (4):




## 2.2.3. Kunlaborado


En nur iom pli ol la duono de la landoj aktivas nejunulara organizo:





Pli ĝenerale pri kunlaboro inter junuloj kaj nejunuloj ni vidas ke, kiam en lando ekzistas nejunaj aktivuloj, en nur fojduono estas rilato inter ambaŭ:




Se temi pri organizoj kun la tipoj de organizoj oni kunlaboras, videblas ke ĉefe temas pri nejunulara Esperanto-organizo, kaj ke en landoj kun organizo estas pli da kunlaborado.





Rilate al servoj kiuj ni povus provizi estas simileco kun la landaj organizoj:





## 2.2.4. Informado

Ne ĉiuj havas tutlandan komunikilon, apenaŭ kelkaj landoj havas unu apartan nur por junuloj. Entute 11 el 25 landoj indikis, sendepende de la aĝo, havi publike serĉeblan paĝ(ar)on. Laŭkvante oni uzas:




Rilate al varbado ni plej povus helpi pri prelegoj, afiŝoj, atelieroj, flugfolioj kaj vizitkartoj:



# 3. Faka analizo

Partoprenis 6 fakaj organizoj kiuj estas junularaj aŭ pripensas la eblon krei junularan sekcion:


- **Asocio de Voĉoj Junaj Benino por Disvolviĝo** (AVJBD)
- **Esperanto kaj Libera Scio** (ELiSo)
- **Esperanto-Universala Rok-Organizo, Kolektiva Komunik-Asocio** (EUROKKA)
- **Internacia Scienca Asocio Esperantista** (ISAE)
- **Skolta Esperanto-Ligo** (SEL)
- **Verdaj Skoltoj** (VS)

## 2.2.1. Membreco en TEJO

Ni nuntempe kalkulas kun du fakaj sekcioj: EUROKKA (rokmuziko) kaj BEMI (biciklado). La unua partoprenis kaj ne la dua, sed ambaŭ estas iel aktivaj. De la sekva punkto ni ne konsideros BEMI por la analizado.


La aliĝsituacio jenas:

- 2 jam membras (BEMI kaj EUROKKA).
- 2 estas junularaj kaj povus aliĝi (SEL kaj VS).
- 1 estas en strukturigprocezo (AVJBD).
- 2 nuntempe ne povus aliĝi pro ne nelaŭaĝa distingo (ELiSo kaj ISAE).





## 2.2.2. Jura personeco

La duono estas jure registritaj, kaj du estas malformalaj:





## 2.2.3. Informado


Oni kalkulas ĉefe kun Facebook-paĝo, retpaĝaro kaj reta novaĵbulteno:




Ne ekzistas iu ĉefa maniero sekvi la agadon de la fakaj organizoj:





Rilate al varbiloj kaj varbteknikoj kiujn oni uzas kaj ŝatus plibonigi facile videblas ke oni ŝatus helpin pri preskaŭ ĉio. Plej gravus afiŝoj, flugfolioj, vizitkartoj kaj adresvarbado:





## 2.2.4. Kunlaborado

Ne eblas diri ke ekzistas ĉefa kunlabormaniero inter fakaj organizoj surbaze de la datumoj:





Inter proponeblaj servoj de TEJO oni indikis interesiĝon pri la jenaj:





## 2.2.5. Ekonomio


Ĉu via faka asocio havas en tiu ĉi momento pozitivan bonhavon?





Ĉu via faka asocio petas subvenciojn aŭ serĉas aliajn ekster(esperantuj)ajn monfontojn?




Pritraktante la manieroj perlabori monon, la ĉefaj estas membrokotizoj kaj vendado:





Ĉu vi havas varbmaterialojn kiujn vi mem produktas?





## 2.2.6. Estraro


Pli ol la duono de organizoj uzas retpoŝtlistojn, el kiuj unu disponas liston nur por estraranoj:





Neniu organizo ŝanĝas sian estraron ofte:




Nur du havas almenaŭ tri estraranojn:



La porestrara voĉdonado kongruas kun la kutima distanco de la gvidantoj:



# 4. Konkludoj

## 4.1. Subvencioj


Malgraŭ la kritikoj la klara venkinto pri kion TEJO laboru por la landaj junularaj organizoj estas eneŭropaj kaj interkontinentaj projektoj Erasmus+.

Atente pri la kresk-adaptigeblo de nia subvencipetado ni havas superendajn defiojn por kontentigi la intereson. Menciindaj kiel rekta konkludo de la esplorado:

- Pli da komprenigo pri kiel nia subvencipetado funkcias antaŭe kaj dumprojekte.
- Multe pli da jure registrotaj asocioj.
- Pli da estraranoj en la landaj organizoj por ke ili estu pli fidindaj por longtempaj projektoj.

## 4.2. Funelo de Landa Agado

En la jaro 2014 estis kreita kategori-sistemo kun la ŝtupoj *Aktivega*, *Aktiva*, *Vekiĝanta*, *Zorgiga* kaj *Dormanta*, kiu klasifikis la organizojn surbaze de multaj kriterioj de KODEJO. Mi ŝatis tiun bazon, sed decidis fari kelkajn ŝanĝojn por ke la sistemo povu ne dependi de la enketilo, funkciu kiel ĉiutaga analizmetodo, uzeblu por landoj sen junulara organizo kaj montru tendencon, interalie.



La ideo estis havi direktigan metodologion en Landa Agado kiu permesu rapide identigi en kiu fazo troviĝas la junulara movado de lando kaj veni al konkretigita aro de potencialaj lamaĵoj, necesoj, agadebloj, iloj kaj strategioj.

Sekvas la kategoriigo de la partoprenintaj landoj, kiu montras ĝeneralan trarigardon. Antaŭe komprenu ke:

- Ĉi tabelo montras *purajn tipojn*; povas esti ke lando en kategorio proksimegas al alia.
- La direkto estas komplemento; lando malpli aktiva povas esti pli forta ol alia pli aktiva.
- Ni fokusiĝas pri junularo.

| | **DEZERTO** | **ĜERMO** | **KONSTRUO** | **DISVOLVIĜO** |
|---|---|---|---|---|
| Pli aktivaj (↑) | Madagaskaro<br>Maroko<br>Meksiko | Senegalo<br>Usono<br>Dominika Resp.<br>Kanado<br>Venezuelo<br>Turkio<br>Ĉinio<br>Kartvelio<br>Svedio<br>Svislando<br>Litovio<br>Aŭstralio<br>Ĉilio<br>Indonezio<br>Japanio<br>Barato<br>Britio<br>Hispanio | Benino<br>Filipinoj<br>Francio<br>Irano<br>Katalunio<br>Togolando<br>Vjetnamio | Ĉeĥio<br>Germanio<br>Italio<br>Nederlando<br>Slovakio |
| Same aktivaj (→) | Grekio<br>Luksemburgo<br>Peruo | Argentino<br>Belgio<br>Finnlando<br>Nepalo<br>Nikaragvo<br>Norvegio<br>Rusio<br>Tajlando | Burundo<br>Ukrainio | Pollando |
| Malpli aktivaj (↓) | Kostariko<br>Ruando | Aŭstrio<br>Danio<br>Kenjo<br>Kolombio<br>Koreio<br>Niĝero<br>Pakistano<br>Tanzanio | Hungario<br>Kongolando | Brazilo |

La identigitaj variabloj montras sufiĉe bone la ĝeneralan situacion, sed ni daŭre esploros por plibonigi la kategoriigon daŭre celante havi ĉiutage uzeblan metodologion.

## 4.3. Eksigo

Laŭ publikaj informoj ni kalkulas kun 46 landaj sekcioj, sed ĉi tiu esplorado uzis metodon kiu nur povis identigi 29 (37% malpli) sekciojn kiuj estas iel aktivaj, sendepende de ĉu ili havas ĉe ni reprezentanton aŭ ne. Krome, iuj el ili estas sendube mortintaj de pluraj jaroj, kaj en kelkaj landoj de teorie ekzistantaj sekcioj ni ne sukcesis trovi junajn aktivulojn.

Same kiel ni agnoskas novajn landajn sekciojn surbaze de plenumo de kriterioj, ni devus agnoski la malplenumon, por ne mensogi al ni mem kaj reprodukti pli fidindan bildon. Sed mi vidas du problemojn:

1) **Por Eksteraj Rilatoj konvenas montri kiom eble plej multe da membrantaj landoj.**

   Eblus enkonduki la senrajtan rolon *observanta organizo*, kaj ili povus esti la sekcioj kiuj ne havas nomumitan Komitatanon A. Tio ankaŭ helpus solvi la problemon ke foje niaj organizoj ne scias ĉu ili estas sekcioj se ili ne havas reprezentanton. Sed kiuj estas la kriterioj por konsideri ke ni havas sekcion en iu lando? Laŭ mi, se ili eĉ ne pretas unu fojon jare informi nin pri sia situacio kaj bezonoj, ili ne devus esti niaj sekcioj pro, sendepende de la alekstera bildo, aldonado de interna bruo. Kaj inter la sekcioj sen Komitatano sed ja kunlaborantaj, kiuj malmultas, povus ekzisti la risko de memkomfortiĝo en tiu baza membreckategorio.

   Aliflanke bona funkciado signifas ke inter vortoj kaj realo estas kiom eble plej malmulte da distanco, aŭ alivorte estas granda simileco inter formala kaj neformala agnoskoj. Kaj povas okazi cirumstancoj kiel tiu okazinta la pasintan monaton, kiam danke al nia kvantargumenta fanfaronado reprezentanto de neesperanta amerika organizo petis al ni kontaktinformojn kaj komenciĝis diskuto en la eksterrilata komisiono pri kiun nomon diri, ĉar nia usona sekcio estas mortinta. Bonŝance per referencpunktoj ni agnoskis ke estas junaj aktivuloj en ŝtatoj sen landa junulara organizo kaj jam povas facile kontaktigi. Sekvota paŝo estas aperigi mondmapon en nia retejo kun ĝisdataj kontaktinformoj, ne nur en landoj kun sekcio, kiu kontribuu al la grupigo de lernantoj kaj interesiĝantoj.

2) **Niaj reguloj ne kapablas sekvi nian propran ritmon.**

   Pasintsomere ni ŝanĝis niajn regularojn kaj plifaciligis la aliĝeblon de novaj kaj reaktiviĝantaj landaj organizoj (nun havi tri membrojn sufiĉas por komenci aliĝprocezon). Tamen, en nia Statuto (4.12.4.) aperas la regulo *“Post dujara nemembreco aŭ post nuligo de la eksigdecido fare da la Komitato de TEJO, eksigita asocio rajtas peti permeson denove aliĝi. Pri tio decidas la Komitato de TEJO”*. Tio signifas ke, se ni eksigas organizon, ĝi ne rajtas peti reaniĝon ĝis du jaroj poste, kio kontraŭdiras la

plifaciligon de eniro por ke oni kunkresku kun ni, kaj ne agnoskas ke socia realo povas signife ŝanĝiĝi en nur unu jaro.

Oni emas bonvenigi organizojn kaj pligrandigi nian projekton de tutmonda junulara organizo, sed ne estas tiom facile ĝisi iun. Krome niaj reguloj ŝajnas kreitaj por desegni rigidan bildon, kiu verdire povas havi sencon por la bildo de TEJO. Sed ni ne devus eterne loĝi kun amasiĝantaj kadavroj. Pro tio mi propronas du regulojn kiuj estas taŭgaj konsiderante la du suprajn flankojn kaj kiu kongruas kun la aldono de referencpunktoj:

- Se lando kun sekcio ne plenigas KODEJO dum du sinsekvaj jaroj kiel organizo, ĝi estas aŭtomate eksiĝinta.
- Por ne timi agnoski la realon de malaktiviĝo, de eksiĝo ĝis realiĝeblo pasu almenaŭ unu jaro.

Laŭ tiuj ĉi proponoj, kaj se fari retroaplikadon, ni devus eksigi la sekciojn en Bulgario, Ĉinio, Grekio, Haitio, Israelo, Kroatio, Kubo, Madagaskaro, Portugalio, Rumanio, Serbio, Svedio kaj Usono (13). Komparante kun la organiza agado, mi pensas ke tio kongruas kun la realo, kaj atentigas ke du el tiuj sekcioj nuntempe havas Komitatanon A.

## 4.4. Fakaj organizoj

Pro la malsimileco inter Landa Agado kaj Scienca kaj Faka Agado, kaj konsiderante la malmultecon de organizoj, por sekvaj KODEJO-j mi rekomendas eksperimenti per apartigo de ambaŭ analizoj en malsamajn dokumentojn, kaj fokusiĝi pri *kvalitaj datumoj*, ekzemple uzante intervjuojn.

## 4.5. Invito al UEA

Nia esplorado povus esti pli riĉa se ni krucigus datumojn kaj profitus informojn de UEA, ekzemple pri informado por strategiumado, kaj kontaktuloj por semi junularnivele. Tial, kvankam ili ne kalkulas kun mondkomisiono pri Landa Agado, mi invitas ilin realigi ĉiujare enketadon, same kiel faras TEJO de jaroj. Ili povus fari nur kun landaj patraj sekcioj, kaj mi pretas helpi al tio.

## 4.6. Interna prilaborado

Mi kreis pliordigotajn dokumentojn (instrukciojn, temposkemon, sugestojn, ktp.) por helpi ontajn respondeculojn pri KODEJO maniere ke la laboro estu pli rapide farebla, la plibonigoj estu konstantaj, tra la jaroj estu modelo de konstanta plibonigo kaj kompreno por ke estu pli facile revizii antaŭajn jarojn.